********************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO 2016/01 (marto 2016)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

********************************************************************************

Karaj Gekolegoj,

Jen nova informilo, en kiu mi invitas vin al la sekva jarĉefkunveno de AGEI, informas pri programoj en 2016, kaj mencias aliajn novaĵojn.

**A) AGEI-jarĉefkunveno, Germana Esperanto-Kongreso**

**A.1.** Kiel kutime, ankaŭ la ĉi-jara **AGEI-jarĉefkunveno** okazos dum la Germana Esperanto-Kongreso (GEK).

**Einladung: VDEL-AGEI Mitgliederversammlung**
Der Verband Deutscher Esperanto-Lehrer (VDEL-AGEI) lädt zu seiner jährlichen Mitgliederversammlung im Rahmen des 93. Deutschen Esperanto-Kongresses (https://www.esperanto.de/eo/enhavo/93a-germana-esperanto-kongreso-2016) in München ein.
Diese findet am Sonntag, den **15. Mai 2016 im Tagungszentrum Kolpinghaus München-Zentral GmbH, Adolf-Kolping-Straße 1, 80336 München** statt.
Beginn ist um **17:00 Uhr**.
Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht. Der Vorstand erwartet daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.

**Invito al: Jarĉefkunveno de AGEI**
La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) invitas ĉiujn siajn membrojn al la ĉi-jara ĉefkunsido, okazonta enkadre de la 93a Germana Esperanto-Kongreso (München, inter 13-16 de majo 2016).
https://www.esperanto.de/eo/enhavo/93a-germana-esperanto-kongreso-2016
La AGEI-kunveno okazos inter **17:00-18:00, la 15an de majo, 2016 en la kongresejo Tagungszentrum Kolpinghaus München-Zentral GmbH, Adolf-Kolping-Straße 1, 80336 München**.
Ni esperas je ĉies aktiva partopreno.

Proponata tagordo:
1. elekto de la gvidanto de la kunsido. Salutado, malfermo. Elekto de protokolanto, kontrolo de laŭstatuta invito kaj decidpovo
2. decido pri la tagordo
3. raportoj de la kasisto kaj la kasrevizoroj
4. raporto de la estraro. Malŝarĝigo de la estraro
5. elekto de la estraro
6. pluaj aktivecoj kaj proponoj
7. laborplano por la sekva agadjaro. Decido pri loko kaj dato de la sekva jarĉefkunveno.
8. diversaĵoj

Koran bonvenon!

Zsófia Kóródy
AGEI-Vorsitzende
AGEI-prezidanto

**A.2. Asociaj novaĵoj**

Ekde kelkaj jaroj estas planata mebloaĉeto por oficeja uzo en la sidejo de AGEI en Herzberg. En la lastaj monatoj ni sukcesis akiri kelkajn taŭgajn pecojn (komodstilan ŝranketon kun bretoj, fakoj, kaj kelkajn bretarojn) por la pedagogia-metodika fakkolektaĵo, lernolibroj, vortaroj kaj faklibroj en la biblioteko de Interkultura Centro Herzberg).
AGEI-estrarano Karin Klose informis nin, ke ŝi ne rekandidatiĝos por la nova dujara deĵorperiodo. Nova proponito por la estraro estas Martin Ptasinski, studento de lingvistiko, trejnito de la studoj ĉe Germana Esperanto-Centro, Klerigejo de GEA kaj finstudinto de la unujara instrukapabliga studfako en la Adam Mickiewicz Universitato en Poznan, Pollando.

**B) Klerigofertoj kaj lingvokursoj kun metodika trejnado**

**B.1.**Wir laden herzlich zur **Esperanto-Sprachwoche** (Kursus) vom **25.04.2016 bis zum 29.04.2016 in Herzberg (Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg)** ein. Hier stehen alle modernen Medien und eine einzigartige Lern- und Studienbibliothek (neu eingerichtet) zur Verfügung. Auch gibt es hier viele neuartige Esperanto-Serviceangebote.
Falls sich 7 - 10 Teilnehmer anmelden, wäre auch ein Bildungsurlaub bei unserer KVHS Göttingen-Osterode noch möglich, ansonsten findet der Kursus bei uns im Esperanto-Centro statt.
Für Rückfragen stehen wir Ihnen gern zur Verfügung.

Bv. aliĝi al internacia **Esperanto-lingvosemajno (Esperanto-kurso) de la 25a ĝis la 29a de aprilo 2016 en Herzberg**.
Tiu evento vere gravas, ĉar la Esperanto-movado bezonos ne nur novajn Esperanto-parolantojn sed ankaŭ instrukapablajn, metodike trejnitajn aktivulojn. Granda fakbiblioteko (novaranĝita, ampleksigita) ankaŭ estos je via dispono.
Rilate al partoprenkondiĉoj, enhavo, favorpreza tranoktado, ktp. vi povos demandi la kursgvidantojn: Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy aŭ legi detalojn ĉe:
http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=26521492

Aliaj lingvokursoj, lernebloj en 2016: http://www.ic-herzberg.de/page.php?pid=63493187

**B.2. Klerigkursoj, studsesioj kaj seminarioj de Germana Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg)**
Ankaŭ en 2016 okazos pluraj klerigofertoj pri Esperanto-literaturo, lingvistiko, historio, movadaj konoj, informado, varbado, metodiko, ktp. en Herzberg, detalojn vi povos legi ĉe
http://www.ic-herzberg.de/page.php?pid=81093452

**B.3. NOVAĴO: Modula interreta trejnado**
Teamo de kunlaborantoj de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg kaj de AGEI, fakuloj pri Esperanto kaj instruado ellaboradas studmaterialojn pri la fakoj, temoj bezonataj por instrukapabliga trejnado. Tio celos helpi la prepariĝon al estontaj ĉeestaj seminarioj kaj aldoniĝos al fakprelegoj por pliprofundigi sciojn. En la postularo estos legado de sciencaj verkoj, kontrol-demandoj, solvendaj taskoj por memtaksado de evoluo, kaj instigo al verkado de fakaj studoj, ktp. La modula strukturo jam estas detale pridiskutita, la unuaj partoj estas ellaborataj, dividitaj laŭ temoj ekz. pri gramatiko, lingvistiko, metodiko, historio, literaturo, movadaj konoj, ktp.
Prezentado de la strukturo kaj la interna laboro okazos dum la 83a GEK en München.

**B.4. Interlingvistikaj Studoj en Poznan**
1) 3-jaraj **postdiplomaj studoj** povos restarti **en 2017**. Informoj troviĝas en la retejo http://www.amu.edu.pl/~interl/

2) **instruista trejnado** - okazos en la studjaro 2016/17. La unujara formado estas kune kun la instruista specialiĝo de la interlingvistikaj studentoj. Eblus partopreni ankaŭ aliajn specialiĝojn de la studoj kaj la aktualajn komunajn prelegojn kaj fine ricevi konfirmilon pri la partopreno de UAM.

3) Eventuale oni povos provi organizi specialan **modulon pri interlingvistiko** enkadre de la tn. etnolingvistikaj magistraj studoj en la Lingvistika Instituto, se estus min. 15 pagantaj partoprenantoj el aliaj landoj. Eble eĉ eblus al ĝi aldoni komence lingvoinstruadon, tiel povus ĝin partopreni komencantaj esperantistoj. La studoj rilatus ankaŭ al ĝenerala lingvistiko. Temus pri 2-jara restado en Poznano.
Kontaktpersono: Prof. dr Ilona Koutny, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, Universitato Adam Mickiewicz, al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan, http://www.amu.edu.pl/~interl/.

## C) Lernofertoj

### C.1. Lingvokursoj, lingva ekzercado

Volonte ni plusendas alvokon de Alexander Neuhaus por la **Nurenberga Esperantokurso (NEK)**: **Semajnfina Esperanto-Kurso** okazos **22-24.04.2016** en Nürnberg. Kursgvidanto estos Gunter Neue kaj ĝi estos faronta laŭ la unua duono de la Tesi libro (do proksimume A1-A2). Kostoj: 45 eur, detalojn petu de kurs@esperanto-bayern.de.
Informojn legu ĉe https://www.esperanto.de/de/enhavo/esperanto-wochenendkurs-n%C3%BCrnberg-vom-2204-24042016

**C.2. Lingvokurso por komencantoj** okazos dum GEK en München.

### C.3. Per SKYPE: lingvoekzercado, lernado kun klubanoj

De aprilo 2016 **merkrede inter 18:00-19:00** (Mez-Eŭropa Tempo) la Esperanto-klubo virtuale malfermas sin por lingvolernantoj el la tuta mondo. Sub gvido de spertaj instruistoj Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy eblas rete aliĝi al la klubkunveno kaj ekzerci paroladon pri ĉiutagaj konversaciaj temoj, akiri novan vortprovizon kaj peti helpon pri gramatiko, lingvouzaj kutimoj, informiĝi pri movadaj eventoj, ktp. Lerneblo ankaŭ por **ret-lernantoj de lernu.net kaj Duolingo**. **Skype-nomo: ic-herzberg**

## D) Lingvoekzamenoj

**D.1. La ekzamenoj de Germana Esperanto-Instituto** havas longan tradicion kaj altan reputacion.
Temas pri "multe pli" ol la tipaj diversnivelaj lingvo-ekzamenoj.
Niaj ĉi-jaraj ofertoj: "**Ekzameno pri lingva kapableco/GEI**" kaj "**Supera ekzameno /GEI**"
(ekz. ĝi estas nepra kondiĉo, se vi volas fariĝi "Esperanto-Instruisto/GEA" aŭ "Esperanto-Manaĝero/GEA".
Se en ĉiu ekzamentipo estos almenaŭ po 3 kandidatoj, la **GEI-ekzamenoj okazos en Herzberg la 12an de junio (dimanĉo posttagmeze) kaj en lundo, la 13an de junio 2016**.
Germana Esperanto-Asocio resp. Germana Esperanto-Junularo nepre bezonas / bezonos specialistojn kaj Esperanto-fakulojn dum la venontaj jardekoj!
Bv. skribe aŭ rete aliĝi **ĝis la 30a de aprilo 2016** kune kun via resuma biografio kaj pruviloj rilate al scioj pri Esperanto, ktp.

**D.2. KER-ekzamenoj** de UEA okazos multloke: http://www.edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj, ekz.
la 4-an de junio 2016 dum la **5a Tutmonda Ekzamentago**, aŭ
la 29-an de julio 2016 dum **UK en Nitro**, Slovakio. En la ekskurso-tago (27.07.2016) okazos eksurso al Budapeŝto, al la ekzamencentro. Detaloj ĉe http://edukado.net/novajhoj?id=607

## E) Internaciaj eventoj

**E.1. 49-a ILEI-Konferenco** okazos inter **30.07-06.08.2016 en Nyíregyháza, Hungario**.
Ĝia ĉeftemo: Novaj vojoj de lernado
**Ĝeneralaj informoj:**
https://docs.google.com/document/d/14AlF354EjO1zAkOT65uSPhYOnbAiebbF-p36Fyts5Vc/edit
**Programo:** http://www.ilei.info/konferenco/2016/Konferenco2016_programo.pdf
**Reta aliĝilo:**
https://docs.google.com/forms/d/1dBib7HGPxjeIGQAI3oHfON4COOlPz37wvmp9Cr_aYsQ/viewform
**Aliĝilo** (papera versio): http://www.ilei.info/konferenco/2016/Aligxilo2016.pdf
**Detaloj:** Konferenca paĝo de ilei.info kaj http://ilei2016.nyirenergy.hu/, konferenca retejo de LKK.
**Loĝado** mendebla per: https://docs.google.com/…/10Claz1M6u97YoZco0yheMIC…/viewform.
**Loĝejoj:** https://docs.google.com/…/1QUFKBP1rfptuR8I3iQgkHv8Eu9…/edit…
**Limdato** por aliĝo kun malplej alataj kotizoj nun eblas ĝis la fino de aprilo per la aliĝilo
https://docs.google.com/…/1dBib7HGPxjeIGQAI3oHfON4…/viewform aŭ:
http://www.ilei.info/konferenco/2016/Aligxilo2016.pdf
**Kromaj informoj**: https://www.facebook.com/groups/1527176740926146/
Bonvenon!
Kombinu vian partoprenon kun UK, kiu okazos antaŭ la ILEI-konferenco inter 23-30 julio 2016.

**E.2**. La **101-a Universala Kongreso** de Esperanto okazos en **Nitra, Slovakio inter 23-30 julio 2016**. Pliajn informojn pri aliĝo trovu ĉe la retpaĝo de UEA http://uea.org/kongresoj. Mendeblaj servoj, pagendaj programeroj per la reta mendilo de UEA (http://uea.org/kongresoj/mendilo). Ilia kodo estas indikita apud la titolo. Nepre mendu ilin, se vi volas partopreni, la lokoj estas limigitaj.
Menciindas, ke estas tre favoraj tranoktebloj. Ankaŭ eblas vojaĝi al Nitra tre malmultekoste. Ekzemple per aviadilo al Vieno (transporto pere de UEA de Vieno al Nitra eblos), estas ankaŭ trajnoj kaj busoj el multaj regionoj de Eŭropo.

La 101a Universala Kongreso verŝajne estos la plej juneca el ĉiuj ĝisnunaj UKoj danke al la engaĝo de multaj gejunuloj en la Loka Kongresa Komitato, kiuj pretigas interesan (kaj malmultekostan!) junularan programon. La junulara programo estos preparita por ĉiuj aĝ-kategorioj, vi devas nur senti vin juna spirite: http://www.nitra2016.sk/junulara-programo/

De Nitra eblos rekte pluveturi al la ILEI-Konferenco en Nyíregyháza, Hungario.

## F) Lingvolernado, eldonaĵoj, helpiloj

**F.1.** Kun ĝojo ni raportas, ke **2 Esperanto-studentinoj el Herzberg** ricevis stipendion kaj sukcese partoprenis en la **2a "John Buchanan Masterclass"** (16a-18a de marto, 2016) en la **Universitato de Liverpolo, Britio** pri Esperanta lingvo, kulturo, gramatiko kaj literaturo, parte en la angla, parte en Esperanto. Ĝi estas nomita laŭ brita Esperantisto kiu starigis fondaĵon ĉe tiu Universitato en 1930 por antaŭenigi scipovon kaj uzon de Esperanto.
Tuj poste, de la 18a ĝis la 20a de marto 2016 okazis la sama urbo la ĉi-jara Brita Kongreso de Esperanto, kun 61 partoprenantoj el 10 landoj.

**F.2.** Ankaŭ por lingvolernado, ekzercado ni rekomendas sekvi novaĵojn ĉe 'Turingio Internacia', la ĉiumonata **Esperanto-magazino de la libera radiostacio Radio FREI** el Erfurto, Germanio.
Dank' al s-ro Bernhard Schwaiger la elsendo okazas ĉiun unuan dimanĉon de monato je la 9-a horo vespere, laŭ centra eŭropa tempo.
Interrete rekte sub http://www.radio-frei.de/player/flash/flplayer.html, respektive podkaste sub http://www.radio-frei.de

**F.3. La Esperanto-kurso "Zagreba metodo"** estas ciferecigita kaj havas atingeblan retan version ĉe http://learn.esperanto.com/ (kun voĉlegita teksto). Bona materialo fariĝis tiel akirebla kaj uzebla por vasta publiko.
La plano estas traduki la kurson al pluraj lingvoj. Ĝi estas senkosta laŭ la permeso de la aŭtoroj kaj atingebla laŭ la libera licenco 'Creative Commons'.
http://learn.esperanto.com/de/01/

**F.4.** Se vi serĉas **ekzercojn kaj testojn** por memstara lernado kaj por kontrolado de lingvaj kapabloj, vi povas uzi la materialojn ĉe https://www.clozemaster.com/languages/epo-eng/play/multiple-choice
La ekzercoj postulas enmeton de vortoj, ktp. en frazojn kaj kompletigi ilin sencohave. Ĝi laboras surbaze de la angla lingvo, sed estas uzebla ankaŭ sen kono de la angla, nur legante kaj provante kompreni la Esperanto-frazojn sen traduko.
Oni povas rekomendai tiun ekzercadon ankaŭ por finintoj de la Duolingo kursaro sed estas adaptebla ankaŭ por grupoj en tradiciaj lingvokursoj.

**F.5. Helpu al lernejo en Rumanio**
En nova Esperanto-kurso en rumania lernejo en Bukovino partoprenas gelernantoj, kiuj kun la instruisto, Bodale Ionel volas lerni en gaja etoso. Ili ne nur ŝatas kanti sed decidis fari marionetan teatron. Do, ili serĉas kontaktojn per Esperanto kaj personojn, kiuj havas kaj povus vendi al ili librojn kaj materialojn pri marioneta teatro. Kontaktu la instruiston rete per: bodliv@yahoo.com

**F.6. Lingolia.com – por perreta lernado**

Tre bone ellaboritan lernmaterialon por memlernado kaj vortekzercado ofertas la reta kursaro por germanlingvanoj ĉe https://esperanto.lingolia.com/de/. Oni trovas tie helpon, klarigojn pri

- prononcado
- gramatiko
- vortprovizo
- informoj pri Esperanto, lingvouzado, movadaj eventoj

La reta materialo estas ankaŭ havebla en deŝutebla .pdf-formato (5 eur) kaj baldaŭ aperos ankaŭ kiel libro. Ni rekomendas ankaŭ la libere haveblan kalendaron por vort-ekzercado ĉe
http://s3-eu-west-1.amazonaws.com/lingolia/calendar/2016/lingolia_2016_eo.pdf
Novaĵo estas, ke per poŝtelefonoj eblas ekzerci ankaŭ Esperanton uzante la programon ’Esperanto Daily’: https://www.lingolia.com/de/daily
La materialoj estis pretigitaj en kunlaboro kaj sub lingva reviziado de Interkultura Centro Herzberg.
La aŭtorino Heike Pahlow partoprenos en GEK kaj volonte respondos demandojn.

**F.7. Ĉiutage 30 homoj finas la esperanto-kurson ĉe duolingo**
https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online
La kvanto de registritaj eklernantoj en la anglalingva, reta Esperanto-kurso ĉe Duolingo jam superis 300.000 homojn. Finstudas ĝin kompreneble nur malgranda parto de ili, sed eĉ tiel ĉiutage ĉ. 30 homoj atingas la finon de la kurso. Ĉi-jare laŭplane estos lanĉita kurso por hispan-lingvanoj. En postaj jaroj estas planataj kursoj interalie por ruslingvanoj kaj ĉinlingvanoj.
*(Novaĵservo RET-INFO / Lingvo-Studio, László Szilvási)*

**F.8. El Eŭropa Bulteno febr. 2016, No 157:**
Esperanto ĉe germanaj universitatoj estas instruata interalie en Leipzig, Münster kaj München. En **Bamberg** studentoj havas la eblecon akiri poentojn por la studfino. "Komercaj informadikistoj devas komenci studi novan lingvon, kaj ne malmultaj pro scivolemo elektas Esperanton. Ankaŭ en Studium Generale la intereso ne malkreskis en la pasinta jardeko, 15 personojn ni ricevas por komencantaj kursoj ĉiujare," diras Martin Haase, profesoro ĉe la Departemento de latinida lingvistiko ĉe la Universitato de Bamberg.
Ĉe la Hochschule **Emden / Leer** (Niedersachsen) studentoj de Socia Laboro povas elekti Esperanton kaj tiel plenumi sian devon de lingvokurso. "Ni ĉiam havas almenaŭ 20 partoprenantojn. Multaj venis kiuj ne estas bonaj en fremdaj lingvoj. Post unu semestro ili parolas en Esperanto je nivelo por kiu oni kutime bezonas en la franca kvar lernejajn jarojn," diras la preleganto Sebastian Kirf. Pli ĉe: http://www.sueddeutsche.de/bildung/kunstsprache-esperanto-bruecken-bauen-1.2854062-2
*(El Sueddeutsche Zeitung, 12. Februaro)*

**F.9. Alvoko al lernejanoj:**
Esperanto Hamburg hat einen Esperanto-Gedichtwettbewerb für Schülerinnen und Schüler ausgeschrieben; es geht um das Vorlesen von Esperanto-Gedichten:
"Für die Aussprache gibt es in der internationalen Sprache Esperanto klare, einfache Regeln. Wer diese beherrscht und noch zur Schule geht (Höchstalter 19 Jahre), kann sich für den Esperanto-Gedichtwettbewerb bis zum 14.07.2016 anmelden. Ihr braucht die Gedichte nicht auswendig zu lernen! Ihr sollt sie nur gut vorlesen." Detaloj: http://esperanto-hamburg.de/poezio/

**G). Instrufilmoj**

**G.1.** Jen **kelkaj ofertoj al filmŝatantoj**, interesiĝantoj pri utiligo de filmetoj, registritaj kantoj, ktp. en kursoj, por instruado. Ili taŭgas ne nur por infanoj sed por komencantaj lingvolernantoj por vigligi lecionojn kaj lerni kun ĝojo per ripetado kaj per bildoj. Estas planoj pretigi al ili subtitolojn.
https://www.youtube.com/channel/UCxZeYDGx8SGdIu1WfFfIc5Q
Saluton; https://www.youtube.com/watch?v=rw9thACx920
Eta araneo: https://www.youtube.com/watch?v=x5Ie9aLtSV4
Lulkanto pri kuko: https://www.youtube.com/watch?v=hCorAJr9ye0

**G.2.** Novaĵservo RET-INFO / Lingvo-Studio sendis informojn pri medicinaj **instru-filmetoj en Esperanto**. La retejo de "Khan Academy" enhavas multajn centojn de sciencaj, edukaj kaj instruaj materialoj por libera klerigado. Antaŭ kelkaj semajnoj kanada esperantisto Matthew Orlowski komencis traduki kaj subtekstigi kelkajn el ili al Esperanto, kaj laŭ la pozitivaj spertoj nun li komencis produkti proprajn filmetojn kun Esperanta voĉo.
La unua, 9-minuta filmeto temas pri "Enkondukaj konoj pri la funkciado de la koro". Estas aldonita ankaŭ la subteksto en E-o, se oni volas uzi ĝin. La filmo estas trovebla en jutubo ĉe
https://www.youtube.com/watch?v=hBpOgt5ldxs
https://www.youtube.com/watch?v=hBpOgt5ldxs,
kaj la ligilo kompreneble ankaŭ en la medicina sekcio de STEB ĉe
http://www.eventoj.hu/steb/ http://www.eventoj.hu/steb/
Gratulon al Matthew Orlowski, kiu komencis konkrete realigi fakan aplikadon. Volonte ni raportus pri apero de similaj materialoj ankaŭ en aliaj sciencaj branĉoj.
P.S. Vortaroj, terminaroj kaj faka literaturo por diversaj sciencaj branĉoj estas troveblaj ĉe la interreta biblioteko STEB.

## H) Libro-ofertoj, eldonaĵoj

**H.1. L2884 Lipari, Michaela/ Tonkin, Humphrey: Tamen ĝi moviĝas - Eseoj pri la Esperanto-movado.** Kolekto de 12 eseoj, premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA, kiuj traktas la Esperanto-movadon en ĝia oscilado inter du ekstremoj - tiu de idealo kontraŭ tiu de praktiko, aŭ tiu de integriĝo en la pli grandan socion kontraŭ tiu de memsufiĉo. UEA, 2015, glue bindita, 150p, 11,90 €
Jen la rekta ligilo: http://www.esperanto-buchversand.de/LipariMichaelaTonkinHumphrey--TamengximovigxasEseojprilaEsperantomovado---L2884---

**L2392 Jensenius, Bent: Bonvenon en nia mondo.** Lego- kaj lernolibro kun tekstoj pri unuopaj eroj de la Esperanto-movado, kiuj montras la vastan uzadon de la lingvo, ekzemple kluboj, Pasporta Servo, muzeoj, ski-semajno, kluboj, UK, ret-babilejoj. Kun dialogoj kaj demandoj.
2009, Kava-Pech, 2009, glue bindita, 126p, 11,90 Eur.
http://www.esperanto-buchversand.de/JenseniusBent--Bonvenonenniamondo---L2392---

**L2677 Dobrzynski, Roman: Die Zamenhofstrasse.**Das Buch besteht aus einer Vielzahl bewegender Gespräche zwischen dem Verfasser und Dr. Louis Christophe Zaleski-Zamenhof , dem Enkel des Schöpfers von Esperanto. Entstehung des Esperanto, seine Geschichte und Zukunftsperspektiven sind wesentliche Themen. Übersetzt von Michael Scherm. 2012, Agenda-Verlag, 326 S., 19,95 €
http://www.esperanto-buchversand.de/DobrzynksiRoman--DieZamenhofstrasse---L2677---
*(Esp.-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, T:06136-46232)*

**H.2.** Zlatko Tisljar: interesa studo en la angla pri Kritikismo kontraŭ Esperanto de doktoro Krunoslav Puškar http://www.esperanto.hr/citaonica.htm#krunop. Tiun ĉi artikolon kaj aliajn pri esperantologio kaj interlingvistiko vi povas legi en la ĵus aperinta jubilea numero de la **lingvistika revuo JKI** (Język. Komunikacja. Informacja. 'Lingvo. Komunikado. Informado') de UAM: http://jki.amu.edu.pl. La artikoloj estas angle kun esperanta resumo aŭ esperante. Ankaŭ la antaŭaj numeroj entenas kelkajn esperantologiajn artikolojn. *(Informo de Ilona Koutny, redaktinto de la speciala numero.)*

**H.3.** Esperantic Studies Foundation (ESF) laboras por progresigi la komprenadon kaj praktikadon de lingva justeco en multkultura mondo, kun la celo disvolvi kaj subteni altnivelan agadon pri esplorado, edukado, kaj interlingva komunikado. http://esperantic.org/en/
**Informilo por Interlingvistoj (IPI)** estas eldonata kvarfoje jare de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). IPI strebas daŭre teni interlingvistojn tra la mondo informataj pri esploradaj eventoj kiuj okazas en tiu ĉi kampo. La novaĵletero estas publikigata plejparte en Esperanto, kaj estas havebla rete kaj en la printita versio IPI (94-95) 3-4/2015: http://esperantic.org/en/communications/ipi/archive.